

ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO-FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Sechster Jahrgang




Nr. 5 Mai 1953

DIE UNIVERSITÄT FRANKFURT

Die Geschichte der Universität Frankfurt, in deren Räumen die Haupt-sitzungen des 31. Deutschen Esperanto-Kongresses stattfinden, zeigt ein schweres Schicksal. Schon die Einweihung stand unter keinem guten Stern, und als sie ihr Wintersemester 1914 begann, war ein großer Teil der Jugend, die sie bevölkern sollte, Kriegsteilnehmer. Trübe sah es auch nach dem Kriege aus. Das Stiftungsvermögen war durch die Inflation derart zusammengeschrumpft, daß es die Kosten nicht mehr zu decken vermochte. Von 1923 an teilten sich dann Staat und Stadt in das Defizit. In diesem Jahr wurde der Universität auch eine Akademie der Arbeit angegliedert, in der tüchtige u. bewährte Gewerkschaftler ausgebildet werden.

Nach der Machtergreifung Hitlers wurde die Akademie der Arbeit sofort liquidiert; sie konnte erst im Jahre 1947 erneut ins Leben gerufen werden. Es sei betont, daß Universität und Akademie der Arbeit in bester Harmonie zusammenarbeiten.

Nach der Inflation 1923 entwickelte sich die Universität sehr rasch, dank der vielen Spenden Frank-



furter Bürger und Industrieller. In den Jahren 1928 bis 1930 hatte sie ihre höchste Blütezeit. Aber schon fielen die Schatten der politischen Uneinigkeit auf das Wirken der Bildungsstätte. Der Anbruch des Hitlerregimes bereitete dem Aufstieg ein jähes Ende. Eine beträchtliche Zahl der Professoren wurde zwangsweise ausgeschieden, und viele emigrierten ins Ausland. Schon war die Schließung der Universität beschlossen; jedoch ein allgemeiner Widerstand von Verwaltung u. öffentlicher Wirtschaft verhinderte das Äußerste.

Im Jahre 1932, am 100. Gedenktage des Todes von Frankfurts größtem Sohn, Joh. Wolfgang von Goethe, wurde die Universität nach ihm benannt. Ihre Angehörigen, im Bewußtsein der ihnen dadurch auferlegten Verpflichtung, bestreben sich, den freiheitlichen Geist, der seit je die alte Mainstadt beseelte, in Forschung und Lehre wirken zu lassen.

Zwar haben die Bombenangriffe einen großen Teil der Gebäude zerstört, aber trotzdem wurden seit 1949 die Vorlesungen in vollem Umfang wieder aufgenommen.

Für das L.K.K.: E. H.

Saluton kaj sukceson

al la GERMANA
ESPERANTO-KONGRESO
je Pentekosto en Frankfurto

kaj al ĉiuj ceteraj Pentekostaj
kunvenoj esperantistaj!

RIGARDO

TRA KONGRESBULTENO EN RAVAN LANDON

Kompreneble, antaŭ ĉio: Ĉu vi jam aliĝis al la 38a Universala Kongreso en Zagrebo? Se vi intencas partopreni, ni konsilas al vi: aliĝu tuj, por ke vi ne bezonu pripensi ĉion lastmomente. Ĝis nun estas jam 825 aliĝoj el 24 landoj (53 Germanoj). La adreso certe estas: 38a Universala Kongreso, Zagreb, poŝtfako 213, Jugoslavio.

Sed ĉi tiuj linioj celas ne rekte la kongreson; ili volas, ke vi jam nun jetu rigardon en tiun ravan landon ĉe la bordo de la blua Adriatiko antaŭ

nelonge ree malfermita al la turismo. Certe estas konata al vi la nomo Abbazia, fama perlo kaj denove celo de grandaj kaj malgrandaj (legu: kun malpezaj monuoj) turistoj. Nun tiu plej moderna kaj grandioza banloko nomiĝas Opatija, kie kuniĝas pompa subtropika floraro kaj plantaro kun la kreskajaro el la Alpoj. Bananujoj, bambuoj, magnolioj, kamelioj, citronkaj oranĝarboj, kaktoj, gigantaj cedroj, pinoj, kaj ĉie laŭrujoj kaj kaŝtanujoj. Nur flanke estu menciite, ke je via



Oriente en Eŭropo:
Gracila minareto en Serajevo




De la teraso de unu el la multnombraj vilaoj en Opatija oni povas ĝui la tutan sorĉan ĉarmon de la jugoslava Adriatiko



La pitoreska banstrando de Dubrovnik

dispono estas 120 hoteloj kaj pensionoj.

Sed viaj deziroj pelas vin pli suden? Bone! Do ni vojaĝu, prefere per ŝipo, al Dubrovnik (la iama Ragusa). Jam de malproksime ekbrilas ĝiaj blankaj muroj, kaj la blueco de la maro, la verdeco de la plantaro kaj la blankeco de la domoj formas kune preskaŭ nepriskribeblan kontraston kaj samtempe delikatan harmonion. De ĉi tie oni havas ankaŭ okazon fari ekskursojn al la interno de



Tipa kamparano el Montenegro,
persistema kiel liaj montoj

la lando, al la „oriento“ de Eŭropo, Bosnio, Hercegovino kaj Montenegro. Tie vi povas studi kaj ĝui orientan vivon, konatiĝi kun homoj formitaj de sia lando je originalaj karakteroj kaj senti vin, se vi volas, en antikva mahometana parto de Eŭropo.

Kaj vere grava punkto: Vi opinias, ke tio estos tro multekosta? Ho, neniel! Jugoslavio apartenas nun al la plej malkaraj turistaj landoj. Imagu ekzemple: Unu litro da vino kostas nur ĉ. 1,50 DM. Kaj turistoj ĝuas 50%an veturrabaton. La LKK volonte vin informos.

LINGVO, LANGO, ŜIBOLETO

Babilajo de Max Butin

(Fino)

Multan ĉagrenon kaŭzas al nebritoj la angla th aŭ al negrekoj la greka d. La nuntempaj grekoj ne plu disponas pri la sono b, kaj mi iam legis en Esperanto-gramatiko por helenoj, ke oni prononcu la vorton „biero“ „mpi-ero“!

Eble vi miras kaj nomas tian procedon koboldajo. Tamen ne estas tia. Ne forgesu, ke la vortoj „lingvo“ kaj „lango“ origine estas identaj: latine: lingua = lango kaj lingvo, greke: glotta = lango kaj lingvo. Ni legas en la Goethe-a verkaro: Mich besuchte ein Mann fremder Zunge. Nek la homo kapricas nek lia lango, kiuj obeas vole-nevole neskribitajn leĝojn de l' medio, en kiu ili vivas.

Parolante pri la greka lingvo, mi devas atentigi pri io tre grava por ĉiuj eŭropanoj. La antikvaj grekoj ne konis la siblan sonon ŝ, kiun posedas ekz. la hebrea lingvo. Pro tio, ke la grekoj ne konis t. e. ne havis tiun sonon en sia lingvo, ili ĝin transformis en s. Tial la vortoj Jesuo, Jerusalemo, Salomono ktp. Ili devus teksti: Jeŝuo, Jeruŝalemo. Moŝeo ktp. Estas tute nekorekte skribi Jezuo, Jeruzalemo, Mozeo, ĉar oni plikripligas tiamaniere la originalajn vortojn (Jeŝuah, Jeruŝalajm ktp.).

Menciinde estas plue ke eĉ inter la izraelidoj troviĝis tribo, nekapabla elparoli la ŝ-sonon, tiu de la efraimidoj. El tiu fakto estiĝis la esprimo „ŝiboleto“. Ŝiboleth (akcento sur o) = spiko en la hebrea lingvo. Nu, ni volas nek falĉi grenon nek spikumi; nin interesas nur la vorto mem. Ĝi estas hodiaŭ internacie uzata en la senco de „signalvorto, ekkoniga vorto“. Kial? Ni vidos.

Kiam la gileadidoj batalis kontraŭ la efraimidoj (kiam homoj ne buĉis unu la alian?) kaj venkis, la venkitoj provis eskapi trans la Jordan-riveron. Sed la gileadidoj baris la transirejon. Ruze la efraimidoj pretendis esti gileadidoj pro samaspekteco, sed la venkintoj estis pli ruzaj kaj devigis la kontraŭulojn elparoli la vorton „ŝiboleth“. La kompatinduloj kapablis nur diri „siboleth“ kaj ili milope perdis la vivon. Tragedio de l' sorto kaj de mankhava parolorgano.

Historie pruvita estas plua „ŝiboletumado“ okaze de la „Sicilia Vespro“ en 1282. Perdinte la batalon kontraŭ la italoj, la francaj soldatoj disfugiĝis, kaŝante sin en dekluvo kaj rokaj rifugejoj. Estis malfacile ekkoni francon en vestaĵoj de insulano. Oni do devigis ĉiun suspektan individuon elparoli la italan vorton „ciceri“ (prononcata itale: ĉičeri). Tremante la francaj viktimoj kriis: Siseri. Mortpiko per ponardo aŭ alia mortigilo finis la „ŝiboletan eksperimenton“.

Mi bone memoras, esti leginta en franca gazeto antaŭ jardekoj pri simila afero en Cinujo. Iutempe (mi ne plu memoras kiam) la ĉinoj per-

sekutis la manĉuojn, kiuj en la dekoka jarcento estis invadintaj kaj konkerintaj la „regnon de l' mezo“ kaj alprenintaj la nordĉinan dialekton, la mandarenan lingvon. La ĉina lingvo estas tre malriĉa je vortradikoj; ĝi disponas pri apenaŭ 900 vortoj aŭ silaboj, sed tre lerte forigis tiun mankon per akcentado laŭ diversaj sonaltoj. Oni do ofte legas la esprimon



Printempe

*En printempajn
flor-foliojn
fluas brue
la unua
fulmotondro,
vokas nokte
la unua
najtingal'.
La ĉiela
pluvo-roso
igas plenaj
la petalojn
en la val'.*

Tradukis Jfb.

*In die Blüten,
in die Blätter
rauscht das erste
Frühlingswetter,
ruft die erste
Nachtigall;
aller Blumen
Kelche füllend,
himmlisch, himmlisch
zu den Wolken
aus dem Tal.*

Leopold Schefer



„kantita lingvo“. Tiuj metodo kaj sistemo estas altgrade evoluintaj kaj ne kompareblaj kun la parolsono de la svedoj en ilia lingvo. La principo (se oni povas paroli pri principo) estas tute alia. Do ĉiu ĉina vorto estas modulebla per diversaj sonoj aŭ sonaltoj kun same multaj signifoj. La mandarena dialekto posedas kvar aŭ kvin, la ceteraj ĝis eĉ naŭ sonakcentoj aŭ gradoj. Nordĉino ne komprenas sudĉinon, almenaŭ ne buŝe. Tion povas nur imagi, kiu estas konscia pri la vastega ĉina teritorio t. e. la ĉinuja teritorio. Ankoraŭ hodiaŭ la stato estas la sama. Cinujo do estas klasika lando por ŝiboletoj. — Ĉinoj

kontraŭ manĉuoj. Bataloj, venkoj, malvenkoj, la teruro de milito. Fine la ĉinoj venkis, kaj la manĉuoj transformiĝis. Ekzistis nur ĉinoj. Sed la „malfalsaj“ ĉinoj fiaskigis la trompon de multaj, kiuj asertis esti ankaŭ ĉinoj. Ree ŝiboleto helpis, perfidante la neverajn ĉinojn. La atakintoj elektis la nombran vorton „lu“ = ses, en la nordĉina dialekto „leo“. Estis facile, trovi inter la amasego da homoj tiujn, kiuj ne kapablis prononci „lu“ per la ĝusta sonakcento kiel loĝantoj de meza aŭ suda Cinujo, kie la manĉuoj servis kiel soldatoj. La manĉuoj fiaskis, kaj lerta ekzekutisto kun ĝentilaj vortoj de bedaŭro senkapigis ilin. — Eble vi miras opiniante, ke estas tre simpla afero diri „lu“. Petu francon, elparoli korekte germane sen franca akcento la nombran vorton „sechshundsechzig“. Mi ne garantias, ĉu ĉiu ekzameno solvos la taskon.

Akra orelo de lingvosperitulo povas distingi (sed ne ĉiam), ĉu persono parolanta Esperante estas ekz. dano (pro la milde-sible sonanta s) aŭ hispano (kiu „ruladas“ la r). Tamen, kaj ni ĝoje agnoskas la fakton konstatante, ke Esperanto altgrade egaligis la elparolan diversecon per modela prononcado.

Rejnlandano senpene povas konstati, ĉu iu estas el la Kolonja regiono, igante lin prononci la vorton „Bloodwoosch“ (sangokolbaso). — Ĉe aliaj germanaj triboj estas simile.

La du mondmilitoj estis taŭga kampo por la aplikado de ŝiboletoj. Por ekkoni germanon (ekzemple spionon), nederlandanoj elektis la vorton „verschrikkelijk“ (terura), ĉar estas malfacile por nelingvosperta eksterlandano imiti la korektan prononcon de la nederlandaj ŝ kaj schr.

Komence de la terura hombuĉado multaj svisoj kaj germanoj, vivantaj transmare, provis ĉiurimede atingi sian hejmon en Eŭropo. Anglaj militŝipoj kontrolis marojn, havenojn kaj — last not least — la pasaĝerojn ŝipe alvenantajn. Multaj germanoj kun falsaj pasportoj asertis esti svisoj. Kelkaj estis eĉ vivintaj dum longa tempo en Svisujo kaj bonege sukcesis en „geografia ekzameno“. Sed la angla polico rutine solvis la problemon. Ĝi venigis veran svison, kiu alparolis la pseŭdosvisojn svisgermane, lingvo t. e. dialekto, en kiu la guturaloj svarmas. Denove fiasko. La kaptitoj konis la ĉefurbon Bern sambone kiel Bernano, sed nur fuŝe, aĉe sciopovis paroli la svisgermanan dialekton.

La mondo ĝis hodiaŭ ne paciĝis; eble ĝi neniam repaciĝos. Popoloj kontraŭ popoloj, gentoj kontraŭ gentoj. Kanonoj tondre pafas. Kapitoj, ruzajoj, trompoj. La ŝiboleto ne mortis. Ĉu ĝi ie en la mondo ludas rolon? Probable. Iam ni certe ricevos valorajn informojn. — Ni do atendu!

Usona junularo hodiaŭ

La verkinto laŭ invito de U.S. Dept. of States frekventis en kvinmonata studrestado dum la vintro 1952/53 usonan universitaton kaj skribis, laŭ nia peto, la sekvantajn impresojn.

Por germana studento estas preskaŭ neeble kaj risko, post nur kvinmonata restado en parto de Nordameriko voli diri karakterizaĵojn pri la usona junularo. Usono kaj ĝia popolo estas tiom senfine variaj kaj multformaj, ke eĉ centoj da libroj ne povus priskribi ilin sufiĉe detale. Tio validas en pli alta grado por la spirito de Usono. En la vastaj regionoj de Usono, de Montana en la nordo ĝis Florida en la sudo, ni ankoraŭ hodiaŭ trovas multajn de la moroj kunportitaj al Usono en la daŭro de la jardekoj de la eŭropaj enmigraĵoj. Nur en la plej grandaj el la mondurboj de Usono, kie la intermiksiĝo de la diversaj rasoj kaj naciecoj progresas plej rapide, ni eble povas trovi la „tipan Usonanon“. Kvankam la junularo estas influata de la gepatroj (kaj estus domaĝo, se ĝi ne estus), la tendenco iras al ĉiam pli grandiganta memstareco jam en tre juna aĝo. Pro tio ke studo kaj kompreno de la usona junularo daŭrus jarojn, tiu malgranda artikolo, skribita komence de 1953, nur povas montri kelkajn supraĵojn kaj eksteraĵojn.

Se mi priskribu certan aĝon, la junuleco de usonano estas pli mallonga ol tiu de germano; ĝi finiĝas kun la deksesta jaro. La pruvo por tio mi ne tiom vidas en la juna geedziĝaĝo, kiom en la manko de ludoj de la junaj knaboj kaj knabinoj tiom kutimaj ĉe ni en la koncernaj jaroj. Nur malmultaj knaboj ĉi-tie vidas la realigon de siaj revoj en „Cowboy“-ludoj, se ili estas pli aĝaj ol sepjaraj, kaj puĝoj perdas sian allogecon ĉe knabinoj pli aĝaj ol dekjaraj. Se oni rigardas la usonajn kaj la germanajn gejunulojn laŭ iliaj gradoj de matureco, la usonanoj sendube antaŭiras nin. Kiel pruvo por tiu aserto servu la tre frua uzo de lipkolorigilo kaj de aliaj kosmetikaĵoj de la „belulinoj“ kaj la socia fenomeno de la „dates“ inter knaboj kaj knabinoj ekde la dektria-kvara vivjaro, kiu estas motivigata per „pligrandigo de la konataro“. Por tiu vorto (to date = interkonsenti pri certa tempo, t. e. rendevui) mi ne jam povis trovi germanan esprimon kaj mi timas, ke ni same kiel „happy end“, nun aŭ pli malfrue, devas kalkuli ĝin al la vorttrezoro de nia lingvo. Ĉi-okaze, estas renkontiĝo de unu knabino kun unu knabo, kiuj poste interparolante iras kune en kafejon aŭ vidas, sidante en la aŭto de la patro, filmon en la subĉiela kinejo. Tiu „date“ estas kutimaĵo en la superaj lernejoj kaj ĉe la universitatoj kaj kaŭzas multe da plezuro al la studentoj (kaj -inoj).

La eduko alcelas, lasi la infanon memstariĝi (spirite) tiel frue kiel eble. En la gepatra domo la infano devas okupi sin mem kaj ĝuas grandan liberecon. Tiu memstareco tiel atingita estas plifortigata en la lernejo, ĉar la unuopa lernanto estas pli kunlaboranto aŭ partoprenanto de la edukado ol „objekto“ de ĝi. Sur tiu kampo mi trovis la klaran klopodon doni al la lernanto kiel eble plej kompletan edukon (ne nur spirite), kiu ankoraŭ evidentiĝas el la oficiala estimo de ĉiuj neakademiaj

okupoj; ĉu oni povus imagi en Germanio la ekzerciston de piedpilkteamo kiel due gravan homon de supera lernejo? La usona edukistemo havis dum la lasta jardeko mirigan prosperon. Lernejoj domoj estis konstruitaj laŭ la plej modernaj spertoj de la higieno kaj de la arkitektura scienco. Modernaj helpiloj, kiuj ne estas disponeblaj jam al la germanaj instruistoj, estas en granda amaso je la servo: gramofondiskoj, magnetofonbendoj, lumbildoj, sonfilmoj, mikrofilmoj kaj eĉ librejoj por la libera tempo. Ĉe ili estas multe pli ol aliloke uzataj la spertoj de la psikologio en la pedagogio kaj ĉe la konsultado pro profesioj. Ofte estas je la dispono de la gestudentoj institucioj por legado, aŭdado, parolado kaj eĉ... geedziĝado (t. e. geedziĝ-perejoj), kaj ili estas uzataj kun sukceso.

Per tio ni estas ĉe la universitatoj, de kiuj ekzistas ĉ. 350 kun entute ĉ. 2.25 milionoj da studentoj (en Germanio 110 miloj). La nomoj de la plej konataj estas Harvard, Yale, Princeton, Syracuse. Ili estas parte ŝtate, parte duonŝtate aŭ private administrataj. Ĉe la ŝtataj universitatoj la studentoj el la sama ŝtato ĝenerale ne pagas studkotizojn, sed nur iom da mono por la socialaj servoj, en kiu estas entenataj la kostopartoj por la ripozhejmaj, liberejoj, naĝejoj, por la amuzoj kiel la orĥestro, la piedpilkteamo, la universitataj revuoj, la dancaraĝaĵoj kaj la sanecservoj kiel la konsilado kaj la kuracado pere de la student-kuracisto. Pro kialoj, kiuj trovas sian kaŭzon en la sociala strukturo de Usono, tiuj socialkotizoj estas ofte pli altaj (ekz. en Florida 75.—dolaroj por studsezono) ol la studkotizoj ĉe la germanaj universitatoj. La plej granda parto de la usonaj studentoj iel laboras apud la studado, kaj tia laboro kaŭzas altigon multe pli ol malaltigon en la estimo. Tre granda parto de la gestudentoj en Gainesville (Fla.) posedas propran aŭton. Ĉ. 30% de ĉiuj gestudentoj estas inoj. Specialaĵo de la usonaj universitatoj estas la studentvilaĝoj, kie logas ĝis 80% de la gestudentoj en proksimo de prelegejoj. La tuto de la prelegejoj, administraj kaj studentloĝejoj formas la „campus“; pro tio oni ankoraŭ parolas pri „campus-politiko“, „campus-aktiveco“ ktp. Tiu formo de komuneco, ĉe kiu minimume tri studentoj kunvivantaj devas indulgi unu la alian, sendube havas edukan valoron kaj estas faktoro de la eksteruniversitata edukado. Anstataŭ la kutima kontrolsistemo ĉe multaj universitatoj ekzistas t. n. honor-regularo, kaj ĉia „plagiato, ŝtelado kaj skribo de senvaloraj ĉekoj“ estas pritraktata de juĝejoj konsistantaj nur el gestudentoj; ĉe gravaj kulpoj studento povas esti eksigata de la universitato. Komentante ĉe usona universitato la studento estas minimume du jarojn pli juna ol en Germanio. Kiel en germana supera lernejo la instruado estas en klasoj de 10—40 partoprenantoj, kun listo de la ĉeestantoj kaj hejmtaskoj. De la unua ĝis la kvara jaro de sia studtempo la lernanto de „Freshman“

(tre bona esprimo!) iĝas „Senior“ kaj finfine „Graduate“. El la granda nombro de la ofertataj kursoj la studento mem povas kompili sian horaron, sed ĝi devas enteni minimume du horojn da sporto posemajne. Interparoladoj de profesoroj kaj gestudentoj okazas pli ofte ol en Germanio. Per ili la interrilatoj inter la profesoroj kaj la studentoj estas pli neformalaj, pli nedevigaj kaj pli fruktedonaj, sed ankoraŭ — laŭ eŭropa vidpunkto — malpli respektplenaj. Fakoj al ni nekonataj apartenas al la kutimaj prelegejoj de la usonaj universitatoj; i. a. elokventeco (effective speaking).

Multe pli klare ol en la superaj lernejoj la usona universitata studento estas enkondukata en la politikan sciencon. Tio estas prelegejoj pri la historio de la usona demokratio, de la partioj, pri la administra sistemo, la registaro, la elektmetodoj ktp. Ĉar minimume la duono de la usonaj gestudentoj devas viziti tiujn prelegejojn, la usona studento ĝenerale mirige bone konas la laboron de sia registaro ktp. kaj kapablas plenumi siajn politikajn devojn kiel civitano. El la sama starpunkto, ke la universitata eduko kondukas al la respondeco-konscienca civitano, estas komprenebla la altestimo de ĉiuj formoj de la studenta memadministrado (kun partioj, elekto-kampanjoj ktp.) kaj de aliaj neakademiaj aktivecoj. Fiere tiuj „studentaj politikistoj“ povas raporti, ke preskaŭ ĉiuj politikistoj de la ŝtato dum sia studtempo iel neakademie aŭ eble eĉ en la „campus-politiko“ kunagis. Estas mia impresio, ke la germanaj universitatoj ĝis nun tro neglektis la politikan sciencon kiel antaŭkondiĉon por la intereso je la publikaj aferoj.

Se ni rondvidas en Usono al „junulmovadoj“ laŭ germana tipo, la skoltoj (boy-scouts) estas la plej aktivaj, sed ilia laborkampoj ofte estas la servo je la komunumo: ili alvokas al partoprenado ĉe la elektoj, helpas al malsanaj kaj kriplaj infanoj, kolektas por tuberkuloz-malsanuloj kaj por la Ruĝa Kruco. Grupoj de junaj kristanoj kaj de junaj politikistoj (ekz. inter la studentaro) staras antaŭ la malhelpaĵo, ke iliaj membroj havas tro malmulte da libera tempo. La transiro de la lernejo al la profesio estas nekutime rapida, ĉar oni ne konas la profesian lernotempojn, kiel ni havas ĝin.

La ordonoj de la germana „Leĝo por protekti la junularon“ estas en la respondeco de la ŝtatoj kaj komunumoj, kvankam la federacia registaro malpermesis la poŝtdissendon de nedecaj literaturajoj.

Kelkaj pluaĵ rimarkoj. La usona junularo speciale ŝatas la tre vaste konatajn bildo-historietojn (comic-strips), kiuj ofte okupas tutan paĝon en gazetoj kaj kiuj dimanĉe aperas multkoloraj kiel aldonajoj. La multkoloraj desegnitaj filmoj, kiuj iĝis propra arto (Walt Disney estas unu el iliaj majstroj), povas entuziasmigi la junularon. Piedpilko (Baseball) kaj la ludantoj estas tre konataj. La migrademo de la usona junularo estas tre granda, kaj Usono estas nemezureble varia lando, kiun esplori kaj konatiĝi multajn miloj da junuloj ĉiujare ekiras. Sed ankoraŭ la emo viziti Eŭropon estas granda, kaj minimume unu germana urbo estas konata al ĉiuj (laŭvorte!) usonanoj: Heidelberg. Kiom el miaj kunstudentoj diris, ke ili tre ŝatus veni al Germanio kiel nesoldatoj!

Jen en du vortoj mia plej granda impresio pri Usono, mia sento en senombraj interparoladoj kun studentoj kaj aliaj personoj: toleremo, ne donacata, sed ĉiutage denove akirenda.

Michel Schmidt (Trad. bor.)

EŬROPO VOJKAS

ĈIUMONATA PAĜO POR LA EŬROPO - MOVADO ESPERANTISTA

Redaktanto: D-ro Jos. Holtmann, Beckum i. Westf., Hühlstr. 10

Ĉu „hereda malamikeco“?

Duona vero estas duobla mensogo

Ambaŭflanke de la Franc-Germana landlimo cirkuladas fama kaj persistema legendo, laŭ kiu Germanoj kaj Francoj estas „heredaj malamikoj“ unuj por la aliaj. Ĉu tiu legendo estas historie vera? Al tiu demando ĉiu objektiva observanto devas kategorie respondi: Ne!

Kiel najbaraj popoloj Germanoj kaj Francoj havis dum sia tuta historio oftajn kontaktojn, kaj pacajn kaj militajn. Kompreneble militoj okazas pli facile kaj pli ofte inter najbaroj ol — ekzemple — inter Ĉinoj kaj Islandanoj aŭ inter Norvegoj kaj Hotentotoj. Sed tiuj, kiuj parolas nur pri la militaj kontaktoj inter Francoj kaj Germanoj, kaj kiuj silentas pri la **pacaj kontaktoj**, esprimas historian mensogon, eĉ duoblan mensogon, ĉar **duona vero estas duobla mensogo**.

Historia fakto estas, ke inter niaj du landoj kaj civilizoj ekzistis dum longaj jarcentoj, de la komenco de nia najbareco, senĉesaj elŝanĝoj intelektaj kaj personaj. Ambaŭ kulturoj sin reciproke fekundigis. Dum la XVIIa jarcento la Francaj hugenotoj, forpelitaj de Ludoviko XIVa, estis frate akceptataj en Germanaj landoj; dum la XVIIIa jarcento Voltaire vivis ĉe la kortego de Frederiko IIa. Dum la XIXa jarcento, antaŭ 1848, multaj Germanaj demokratoj, persekutataj de la Germanaj princoj, trovis akcepton kaj azilon en Francio.

Historia fakto estas, ke antaŭ la XIXa jarcento neniam okazis Franc-Germana konflikto sub formo de milito de popolo kontraŭ popolo: princoj militis kontraŭ princoj, ne per popolarmeo, sed per husoldataroj dungitaj ofte en aliaj landoj; naciaj armeoj tiam ne ekzistis nek ekzistis ĝenerala, deviga militservo. La Tridekjara Milito kaj la Sepjara Milito ne estis militoj inter Germanoj kaj Francoj, sed konfliktoj inter koalicioj, en kiuj Francaj reĝoj alianciĝis kun Germanaj kaj aliaj princoj kontraŭ aliaj Germanaj (kaj negermanaj) princoj. Simila estis la situacio inter 1790 kaj 1813. Nur la Lejpciga batalo estis batalo inter la armeoj de la Franca kaj Germana popoloj. Kaj ree la du popoloj staris unu kontraŭ la alia en 1870/71, en 1914 kaj en 1939.

El tio sekvas, ke Francoj kaj Germanoj intermilitis kiel popoloj nur de apenaŭ unu jarcento. Ĉu tion oni povas nomi „hereda malamikeco“?

Ni do diskonigu ĉirkaŭ ni la veron, ni detruu la mensogajn kaj pereigajn legendojn!

Lucien Laurat

Esperanto ist „hocheuropäisch“!

„Esperanto vereint in sich die Kraft der englischen, die Tiefe der deutschen, die Eleganz der französischen und den Wohlklang der italienischen Sprache.“

Univ. Prof. N. E. Collinson

Libro pri Francio

Anton Hilckmann, **Francio inter hieraŭ kaj morgaŭ**. 224 paĝoj, Eŭropa eldonejo, Freiburg i. Br. 1952. Germanlingve.

„Por ĉiuj en landoj de Germana lingvo, kiuj komprenis, ke la vojo al pli bona Eŭropo estonta nur povos konduki post interkompreniĝo kaj interkonatiĝo de la popoloj.“

Kiu konjektas vojaĝraporton aŭ laŭproze tradukitajn statistikaĵojn pri Fran-


cio, tiu seniluziigite formetos la libron. Prof. Hilckmann prelegas en la universitato de Mainz pri komparanta kulturscienco. En la tempo de plej forta persona mizero pro persekuto naciocionista Francio fariĝis por li dua hejmlando. En sia libro li kolektis spirite reprezentajn voĉojn. Mallonga enkonduko montras la hieraŭan Francion antaŭ la dua mondmilito per rigardo al gazetaro kaj periodaĵaro. La okazintaĵoj de la milito devigis unu parton de la iam tiel fiera lando tutece, la alian parton nur militiste al plej hontiga mizero. Tutece senhonorigis sin la spiritaj kaj politikaj iniciatintoj de Vichy-reĝimo; sed la alia Francio kreskis kaj daŭris vivi sekrete. Tiu re-

zista fronto kreskis el la spirita fronto de la Franca katolikismo, kaj ankaŭ poste la rezista movado restis inspirita ĉefe de ĝi. Post la Hitlera invado en Ruslandon, 1941, ankaŭ la komunistoj anigis kiel nunaj „patriotoj“. Post la venko, en paco, disrompiĝis la unuanimeco en la rezista movado. Sed tamen restas la voĉoj el tiu tempo, kiuj certigas al Francio gvidrolon ĉe estonteca formado de Eŭropo.

Entute la libro estas multfoje per citaĵoj pruvita skizo de Francio al ni grandparte nekonnata, kiu mirigas nin per sia juneco. La antaŭjuĝo de dekadenco Francio estas revizienda post legado de tiu ĉi libro.

V. S.

Lucien Laurat



Trifoje akurate je la dekdua horo...

Romano de Walter Galders

E L L A G E R M A N A T R A D U K I S F R I E D R I C H E L L E R S I E K

Tria daŭrigo

La mastrumistino energie skuis la kapon. „Ne, neniam! Li ĉiam havis grandan timon pro la morto kaj precipe pro la dronado. Li estis treege akvotima kaj eĉ ne kuraĝis iri sur Seine-vaporŝipon. En la pasinta jaro li ricevis inviton al Ameriko, sed li havis timon kaj ne veturis. Magdaleno, li diris, ĉu eble vi volas veturi al Ameriko? Mi havas ĉi tie inviton, sed mi ne kuraĝas veturi. Akvo ne havas trabojn.“

„Ĉu via sinjoro alie vojaĝis ofte?“, demandis Neufeld.

„Ho jes, tre ofte: al Berlino, al Genevo, al Romo (Neufeld enpense faris dikan strekon sub Romo), al Madrido. Li ĉiam sendis al mi ilustritajn poŝtkartojn. Jen ili estas, mi kolektis ilin ĉiujn.“ Ŝi transdonis al Neufeld dikan albumon de poŝtkartoj. „Por kelkaj

semajnoj vi devos malhavi ĝin“, li diris, „sed vi ricevos vian albumon nedifektita.“

La detektivoj nun komencis malplenigi la skribotablon de la droninta antikvajisto. Magdaleno indignis pri la malordo, kiun ili faris, sed ŝi grumblis nur mallaŭte. Ĉiuj skribajoj estis pakataj en kofron, kiun inspektoro Nombriil propramane kunprenis.

„Magdaleno“, li diris antaŭ la foriro, „vi havas la permeson, resti en la loĝejo, sed nur tiukondiĉe, ke vi parolos kun neniuj homoj pri la afero. Kun nia oficisto ĉi tie vi kompreneble povas paroli, kiom ajn vi volas. Li volonte interbabilas iom, ĉu ne vere, Brissot? Sed se vi komencos, eble klaĉi kun samdomanoj, ni devos provizore aresti vin.“

Magdaleno promesis plej severan diskretecon.

Kvara ĉapitro

Boulevard Saint-Michel n-ro 45

Neufeld kaj Nombriil sidis en la ofica ĉambro de l'inspektoro ĉe tablo plenega de paperajoj. Ili zorgeme estis ekzamenintaj la skribajojn de Borel. Iliaj kapoj doloris; sed ili ne estis trovintaj ion, kio povus helpi ilin, fari eĉ nur malgrandan paŝon antaŭen.

„Prenu novan cigaron, kara kolego“, Nombriil diris kaj prezentis al Neufeld la keston. „Odoras ĉi tie tiel malbenite laŭ la polvo el la skribotablo de l'antikvajisto, ke oni devas iom plibonigi la aeron. Kion vi nun diras pri tio? Dum du horoj ni jam traserĉegas ĉi tiun makulaturon kaj estas neniam pli saĝaj ol antaŭe.“

La telefono sonoris. Nombriil anoncis sin. „Bonan tagon, kara kolego Opitz!“ li diris. „Ĉu vi volas sciigi al ni, ke vi solvis la enigmon? Ĉu ne? Do la laŭro ankoraŭ estas havebla. Cetere vi tuj

povas paroli kun Neufeld, li sidas apud mi kaj furioze fumegas brazilan cigaron. Sciuj, ke ni ĉi tie en Parizo ankaŭ ne multe progresis.“ Li donis la aŭskultilon al Neufeld.

Opitz komunikis al li, ke la du Berlinaj viktimoj fine estis identigitaj. Estis artaj-vendisto Klebinder el Lützowstraße kaj vojaĝisto Schwalke el Prager Strasse. „Artaj-vendisto“, diris Neufeld, „tre interese. Vi ja scias, Opitz, ke unu el la Parizanoj estis antikvajisto, do el la sama fako. Ni laŭiris en tiu direkto spuron, sed ankoraŭ ne povas diri ion detalan. Krome alia afero: Bonvolu esplori, ĉu Klebinder aŭ Schwalke dum la lasta tempo eble estis en Romo. Ĝis reaŭdo!“

„Ĉu en Romo? Kial?“ demandis Nombriil. „Estis nur privata ideo de mi.“

Der
Holder-
strauch

Ein Holderstrauch, ein Holderstrauch,
der blüht' so schön im Mai;
da sang ein kleines Vögelein
ein Lied von Lieb' und Treu'.

Beim Holderstrauch, beim Holderstrauch
wir saßen Hand in Hand;
wir waren in der Maienzeit
die Glücklichsten im Land.

Beim Holderstrauch, beim Holderstrauch
da muß geschieden sein.
„Kehr' bald zurück, kehr' bald zurück,
du Allerliebster mein!“

Beim Holderstrauch, beim Holderstrauch
da weint ein Mägdlein sehr.
Kein Vogel singt; der Holderstrauch,
der blüht schon längst nicht mehr.

Sur sambukuj', sur sambukuj',
ariĝis maja flor'.
Pri amo kantis kaj fidel'
birdet' el juna kor'.

Ĉe sambukuj', ĉe sambukuj',
ni sidis, man' en man';
feliĉa kaj amanta par'
en sunradia ban'.

Ĉe sambukuj', ĉe sambukuj',
„adiaŭ“ diris ni.
„Revenu baldaŭ, ho karul!“
insiste petis ŝi.

Ĉe sambukuj', ĉe sambukuj',
ploregas knabinet';
forvelkis jam la sambukuj',
silentas la birdet'.

La
sambukuj'

Tradukis Joklubo

„Dragon quarante-cinq“, diris Nombri kaj rigardis sur malgrandan paperpeceton, kiun li estis trovinta en malgrava letero de Borel. Estis bileto por la subtera fervojo.

„Kion signifas Dragon quarante-cinq?“ demandis Neufeld. „Ankaŭ mi volonte sciis tion. Rigardu do foje tion.“ Nombri donis la bileton trans la tablon. Neufeld rigardis ĝin, remetis ĝin flanken kaj plufoliumis en la paperajoj de la mortinta sinjoro Borel.

„Hodiaŭ estas jaŭdo“, li subite diris, „do eble morgaŭ ni povos konatiĝi kun la bando, al kiu Borel apartenis.“

„Nu, ĉu vi scias, kie ĝi estas trovebla?“

„Eble mi scias tion, sed mi povas ankaŭ erari. Mi opinias, ke ni iom detale rigardu la domon numero 45 en Boulevard Saint-Michel.“

???

„Kompreneble povas esti eraro. Dragon signifas drakon. Kiu estas la fame konata mortiginto de drako? La sankta Mikaelo, kiun oni vidas, sur la fontano ĉe la placo de Sankta Mikaelo, pene okupata per tio. Kial Dragon quarante-cinq ne estu indiko pri la domo Boulevard Saint-Michel n-ro 45?“

„Ha, vi povus esti prava!“ Nombri sonorigis. „Le Bottin, mi petas“, li diris al la eniranta oficisto.

Nombri foliumis en la adresaro kaj eligis fajfon. „Kiel prava vi estas! Kion diris sinjoro Borel, laŭ la depozo de lia mastrumistino, ĉe la telefono?“

„Bone, Mathieu. Kiel ĉiam, Métro Cluny“, diris Neufeld parkere.

„Kaj iu Mathieu loĝas Boulevard Saint-Michel n-ro 45! Kompreneble ankaŭ tio povas esti hazardo, ĉar multaj homoj nomiĝas Mathieu. Tamen mi kredas, ke ni estas sur la ĝusta vojo. Neufeld, ni nun faros paŭzon de duona horo kaj trinkos je la sukceso pri Dragon quarante-cinq glason da vermutvino de Martini!“

En la veninta vespero je la oka la du detektivoj renkontis unu la alian ĉe la fontano de Sankta Mikaelo. Ili malrapide supreniris la iomete altiĝantan bulvardon. La trafiko de piedirantoj kaj veturiloj estis tiel vigla kiel ĉiam en tiu horo. Longaj tramvagonoj sonorigante bruveturis sur la strato supren kaj malsupren. La buldogsimplaj verdaj aŭtobusoj veturis konkure kun la Taxi-aŭtoj kaj privataj aŭtomobiloj.

Nombri interfrotis siajn manojn. „Eble ni atingos nian celon hodiaŭ. La kara latina kolego Casertano en Romo fariĝus flavmalsana, se ni du sukcesus en la afero. Mi ĵus telefonis kun li. La viro, kiu falegis de sur la Kolono de Marko, ankoraŭ ĉiam kuŝas senkonscia. La kuracistoj opinias, ke tia stato povos daŭri eĉ semajnojn. La droninto ĝis nun ankaŭ ne estas identigita.“

Dume ili estis alvenintaj antaŭ la domo n-ro 45. Ne melproksime de la enirejo staris kvin sinjoroj kaj vigle diskutis pri la morgaŭaj vetkuroj en Auteuil. „Kaj mi diras al vi“, deklaris unu el ili per plifortigita voĉo, „Coq d'or gajnos!“

Inspektoro Nombri tuj enmiksitis sin en la interparolon. „La sinjoro estas prava“, li diris, „Coq d'or facile gajnos. Mi povas konsili al vi nur: vetu je Coq d'or, kaj vi estos favorataj de Fortuno!“

Kvazaŭ ili tuj volus rapidi al la veteristo, por lokumi siajn vetojn, la kvin sinjoroj diskuris. Sed ili ne iris malproksimen; ili nur retiris sin en la enirejojn de la apudaj domoj. Nombri malfermis la pordon de n-ro 45. „Kien?“ la pordisto de el sia ejo demandis sen speciala intereso.

„Al sinjoro Mathieu“, diris Nombri.

„En la kvara“, la pordisto murmuris kaj plulegis sian gazeton.

La du detektivoj malrapide supreniris la ŝtuparon. El loĝejo en la unua etaĝo iu malbonege pianludis la muzikajon „Parado de l' amo“, en la dua etaĝo oni aŭdis el loĝejo laŭtan bruon de voĉoj.

PROFETA SONĜO (Traum)

Iuvespere la estro (Leiter) de granda fabriko ricevas telegramon: li devas tuj vojaĝi al la ĉefurbo pro urĝaj aferoj. Ciuj oficistoj jam estas for, nur Keller,

la noktogardisto, estas en la fabriko. Lin la ĉefo petas, havigi al li en la trafikoficejo (Verkehrsamt) flugbileton por la plej proksima aeroplano. „Sinjoro direktoro“, diras Keller, „mi petas vin, ne uzu la aeroplanon! Preskaŭ ĉiutage oni legas pri akcidentoj (Unfälle). Veturu per vagonaro!“ La ĉefo ridetas pri la zorga mieno de Keller, sed ĉi tiu daŭrigas: „Lastan nokton mi sonĝis, ke la aeroplano, per kiu vi volas veturi, akcidentis.“ La direktoro laŭte ridas kaj parolas pri superstiĉo (Aberglaube), sed Keller denove petas, petegas. Fine la ĉefo cedas (gibt nach) kaj komisiis (beauftragt) lin, havigi al li bileton por la ekspresvagonaro. „Car tie“, li diras, „mi povas ankaŭ pli bone prilabori miajn korespondajojn.“



Alveninte en la ĉefurbo, li ekscias kiel (als) lastan novajon, ke la aeroplano, per kiu li volis veni, efektive akcidentis. Tute konfuzita kaj plena de dankemo li rapidas al poŝtoje kaj transsendas al Keller tri mil markojn. La saman sumon li enmanigas al li post sia reveno en la nomo de sia familio. Sed samtempe li anoncas al Keller, ke li maldungas (entläßt) lin. — Kial?

Sie lasen soeben

einen unterhaltenden Text aus unserem neuen Fortbildungsbuch „Post la Kurso“ von Wilhelm und Hans Wingen. Neben solchen Texten enthält das Buch alles, was Esperanto an Feinheiten verlangt, in Form von Beispielen, Erklärungen und Übungen. Es kostet 3,60 DM, zuzüglich 10 % für Porto und Verpackung. Es ist im Format von 15 × 21 cm, fadengeheftet, in kräftigem Kartonumschlag und läßt sich dadurch einwandfrei aufschlagen.

Durch alle Buchhandlungen!

Esperanto-Abteilung
der Limburger Vereinsdruckerei GmbH, Limburg/Lahn

Poe via perfektiĝo

ni rekomendas

Legendoj de Niemojewski	1,50 gmk
El la „Camera obscura“	1,50 gmk
Barbaraj prozaĵoj de B. Prudenci	1,50 gmk
Ano de l' ringludo de Simunoviĉ	1,50 gmk
Servokapabla! Marcus Tybout	1,50 gmk
Verda lakto	—,40 gmk
Junago	0,50 gmk
Nia lingvo Esperanto, unua, dua, tria kajeroj de la unua serio po	0,50 gmk
Al Altaro de Dio! Kat. Preĝlibreto	1,— gmk

Por afranko kaj pakajo bonvolu aldoni 10 %

Librejo de la Limburger Vereinsdruckerei
Limburg/Lahn



Neues Werbe-Plakat für Esperanto!

Für Zigaretten, Schnaps, Likör, Kosmetika und andere Dinge wird mit allen Mitteln geworben. Dabei ist das Plakat neben der Zeitungs- und Zeitschriftenanzeige und der Kinoreklame ein Hauptwerbemittel. Wir Esperantisten müssen es auch wieder mehr zur Werbung für Esperanto heranziehen. Hier zeigen wir ein neues Plakat in verkleinertem Format, das diesem Zweck dienen soll. Der Druck eines wirkungsvollen Plakates ist für einzelne Gruppen viel zu kostspielig. Deshalb haben wir uns entschlossen, einige Vordrucke auszuführen und auf Lager zu legen, damit auch schwache Gruppen sich dieses wirkungsvollen Werbemittels bedienen können. Es ist in Linienschnittmanier im Format 43 × 63 cm in Zweifarben-Druck — schwarz und grün — von einem jungen Samideano gemacht und hat genügend freien Raum, um Vorträge, Kurse und allgemeine Werbetexte noch eindruckend zu können. Preise für nachträgliche Eindrücke gern auf Anfrage. Bei dem verwendeten holzfreien Papier können die Texte auch eingeschrieben werden, wodurch keine weiteren Kosten entstehen. Kein Vortrag, kein Kursbeginn ohne Plakatwerbung!

Die Plakatvordrucke kosten:

1 Stück	—,60 DM
5 Stück	2,50 DM
10 Stück	4,50 DM
50 Stück	20,— DM
100 Stück	30,— DM

Bitte 10 % für Verpackung und Porto!

Esperanto-Abteilung
der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn

Jetzt kommen Kongresse!
Jetzt kommen Auslandsreisen!
Jetzt kommen Ferienlager!

Zur fließenden Unterhaltung über alle Themen
des täglichen Lebens hilft Ihnen unser Sprachführer

Sein gutes Esperanto, seine
geschickte Auswahl der oft
gesuchten Wörter, Ausdrücke
und Sätze sind bekannt!

Preis 1,60 DM zuzüglich
10 % für Porto und
Verpackung!

Esperanto in der Tasche!

Infano deklamis per pepanta voĉo naskiĝtagan poemon, en kiu al la kara onklino estis dezirataj sano kaj longa vivo.

Neufeld aŭdis, ke la dompordo estis malfermata, kaj li faris signon al Nombriĉ. Viro diris al la pordisto „Al sinjoro Mathieu“ kaj suprenvenis la ŝtuparon. „Ni lasu lin preteriri“, Nombriĉ flustris kaj senelekte sonorigis ĉe la loĝejo, en kiu oni festis la datrevenon de la naskiĝtago. Kiam la viro, kiu volis iri al sinjoro Mathieu, preterpaŝis, Neufeld aŭdis, ke Nombriĉ, en la nomo de konata ĉokolad-firmo, transdiris al la servistino korajn bondezirojn por la sinjorino de l' familio.

Neufeld kaj Nombriĉ nun senbrue sekvis la viron. En la kvara etaĝo li sonorigis. Oni aŭdis, ke la pordo estis malfermata kaj virvoĉo demandis pri la ŝiboleto. „Porquerolles“, diris la vizitanto kaj estis enlasata.

„Tre afable de la viro, doni al ni la ŝiboleton“, diris Nombriĉ. „Kara Neufeld, ĉu vi havus la grandan afablecon, reiri malsupren? En la enirejo de la domo n-ro 47 staras la gvidanto de miaj oficistoj, sinjoro Chaland. Diru al li, ke li kun siaj kunuloj singardeme venu supren kaj atendu sur la ŝtuparplataĵo inter la tria kaj kvara etaĝoj.“

Neufeld malsuprenrapidis la ŝtuparon. „Mi forĝis provizi min per cigaredoj“, li diris, preterirante la pordestejon. Li tuj trovis Chaland-on kaj transigis al li la ordonon de Nombriĉ. Kvar minutojn poste li jam ree estis en la kvara etaĝo.

Nombriĉ premis la sonoril-butonon troviĝantan sub la nomo Mathieu. Juna viro kun suspektema vizaĝo malfermis la pordon. „Porquerolles“, diris Nombriĉ. La juna viro lasis ilin eniri kaj gvidis ilin tra longa, malbone lumumata koridoro en grandan ĉambron. Ĉi tiu ĉambro komuniĝis per larĝe malfermita ŝovebla pordo kun apuda, ne malpli granda ejo. Foteloj kaj seĝoj dise staris senorde en ambaŭ ĉambroj. La plej multaj el ili jam estis okupitaj. Nombriĉ kaj Neufeld sidigis sin en du molaj apogseĝoj, kiuj staris tre proksime ĉe la enirpordo.

En la fundo de la dua ĉambro staris kaj kuŝis en multkolora haoso sur longa tablo pentraĵoj, skulptaĵoj kaj aliaj art-objektoj. La tuto aspektis kiel tombola tablo. Nombriĉ ekstaris kaj faris malgrandan rondiron; li interesiĝis multe pri la artaĵoj. Li eligis mallaŭtan fajfon, kiam li ekkonis pentraĵon, kies fotografian kopion li ricevis antaŭ kelkaj semajnoj kune kun informo pri ŝtelo.

„Bonega laboraĵo, ĉu ne vere, sinjoro kolego?“ demandis dika, maljuneta sinjoro kun ondoforma griza hararo kaj binoklumita ruĝa nazo, kiu staris apud la inspektoro kaj per spertula mano karese tuŝis marmoran buston.

„Jes, vere, tre belega, ion tian oni ne vidas ĉiutage“, Nombriĉ respondis kaj daŭrigis la rigardon al la ceteraj valoraĵoj.

La publiko estis strange miksitaj. Ĝi evidente konsistis el du grupoj. Unu estis proksimume dekduo da grandparte korpulentaj maljunetaj sinjoroj, kiuj pasie interesiĝis pri la tombolaj gajnotaĵoj kaj ekscitite babiladis pri ĉi tiuj art-objektoj. Inter tiom da korpulenteco kaj konversacio preskaŭ ne rimarkibliĝis la dua grupo, nome dek pli junaj sinjoroj. Ili estis kvazaŭ malkorpulentaj: gracilaj, trejnita sportuloj kun energiaj vizaĝoj. Por la tombolaj gajnotaĵoj ili ne montris eĉ nur iometan intereson, kaj iliaj interparoloj estis farataj mallaŭte kaj lakone.

„Belega tombolo“, flustris Nombriĉ al Neufeld, kiam li estis fininta sian rondiron, „ĝi valoras kelkajn milionojn da Frankoj kaj multajn jarojn da malliberejo.“

Unu el la gracilaj junaj sinjoroj nun iris post la tombolan tablon, frapis per orumita bat-ringo sur la tabloplaton kaj petis pri aŭskultado.

(Daŭrigota)

Pli ol mil kilometrojn mi jam estis for de mia hejmurbo en norda Germanio. Per trajno mi traveturis Svislandon, Lihtenŝtejnon kaj Aŭstrion kaj ĉie estis gasto de bonkoraj samideanoj. Fine ĉe Chiasso (Kiaso) la vagonaro transpasis la italan limon. Post kelkaj minutoj ĝi denove haltis: Como (Komo)! Sed en la stacidomo mi devis konstati, ke neniu atendis min tie. Poste mi eksciis, ke miaj amikoj pro iu miskompreno atendis min pli frue. Do, en itala lingvo mi demandis sinjoron, kiu staris proksime, pri la Via XX Settembre, kie loĝas la UEA-delegito. „De kie vi venas?“ li tuj rimarkis la fremdan akcenton. „El Germanio.“ — „Tedesco? Bravo! Molto bravo!“ li ekkriis, kaptis mian valizon kaj gvidis min tra la urbo. Survoje li rakontis al mi, ke dum la milito li estis kun la germanaj soldatoj en Afriko.

Tiu ĉi unua renkontiĝo kun italo estis kvazaŭ bona aŭguro por mia tuta vojaĝo en la suda lando, ĉar ĉie mi trovis grandan simpatian por la germana popolo.

D-ro Giordano Azzi, la delegito, tuj poste veturigis min per aŭtomobilo al la kunveno de la Esperanto-grupo, kie mi konatiĝis kun multaj junaj gesamideanoj. Estis ankaŭ s-ano Azzi, kiu multe helpis min en ĉiuj rilatoj. Li donis al mi valorajn konsilojn por la vizito de la vidindaĵoj en la ĉirkaŭaĵo, donacis al mi senpagan bileton por la montervojo al monto Brunate, ĉar li estas direktoro de publikaj veturiloj en Como, kaj li telefonis kun Milano por anonci mian alvenon ĉe la tieaj samideanoj.

Rapidege pasis la tagoj en la mirinda pejzaĝo ĉe la Lago de Como. Dum la lasta vespero mi adiaŭis de tiu bela urbo promene sur la larĝa bordostrato kune kun miaj amikoj d-ro Azzi kaj Aldo de Giorgi. Tiam tute hazarde ni renkontis alian Esperantistinon, f-inon Piera Longetti, kun ŝia patrino kaj germana amiko el Berlino, k-do Erwin Schröter. „La mondo estas malgranda!“ konstatis Aldo, „kaj por Esperantistoj ĝi estas eĉ pli malgranda“.

„Milano! Stazione centrale!“ Jam de malproksime mi vidis la turojn de la impona katedralo kun la ora „Madonnina“ sur la plej alta pinto. Kun ridanta vizaĝo akceptis min s-ano La Pila en ŝia loĝejo. Li estas la ĉiam gaja kaj ŝercema gvidanto de la Milana Esperanto-grupo. Post la vespermanĝo alvenis kelkaj junaj amikoj, kiujn li invitis al sia hejmo. De la unua momento mi sentis min membro de tiu rondeto. Ni kantis kaj babilis multe tiun vesperon, kaj fine mi devis kanti por miaj entuziasmaj novaj amikoj melodion, ankoraŭ bone konatan en Italio: Lili Marleen. Mi eĉ devis ripeti ĝin la sekvontan vesperon, kiam ni kunvenis en pli granda rondo en la klubejo ĉe Piazza Oberdan. Denove ni kantis kaj rakontis. Finfine s-ano La Pila eĉ pruvis siajn kapablecojn kiel dancinstruisto, kaj donis

al mi lecionon laŭ la muziko de gramofondiskoj, kiujn posedas la grupo.

Venis la horo de la foriro. Mi lastfoje donis la manon al miaj afablaj gastigantoj, s-anoj Pino Pinelli kaj Enrico Paoli, kaj ree mia trajno ruliĝis al nova celo. Ĝi nomiĝas Mantova. Mi ne bezonis longe serĉi miajn amikojn en tiu urbo sur la kajo de la stacidomo. Senpacience ili jam atendis min, vestitaj per longaj helaj roboj. Du ĉarmaj junaj fraŭlinoj.

Oliva kaj Pia Rosignoli. Ne gravas, ke ili ne estis perfektaj en Esperanto. Je mia foriro ili estis perfektaj. Tio estis post kvin tagoj. Sed dum tiu tempo ni ĉiam estis kune. Ni ofte komune migris en la urbo, vizitis la faman palacon de la dukoj de Gonzaga, la domon de Rigoletto kaj la Palacon Te'. Kiam ni estis hejme, fraŭlino Pia ne laciĝis dum multaj horoj instruante al mi dancadon. Ekskurso al Padova, Venezia kaj Verona finis mian restadon ĉe la tre gastema familio. Mi devis pensi pri la hejmveturado. Denove mi preterpasis la nun jam bonkonatajn urbojn Milano, Como, Chiasso, Zürich, Konstanz. Mi revenis al Germanio, sed ofte miaj penoj reiras dankeme al miaj karaj geamikoj en la suna sudo, en la „bella Italia“.

Ewald Ebmeier.



Kastelo Grésillon

Ĉe Baugé en Francio estas juvelo de la franca esperantistaro. Ili havis la netakseblan feliĉon akiri tiun imponan konstruaĵon, kiu situas en bela, senmura parko. Nun tiu domo estas kultura centro, kaj vaste ĝi malfermas la pordojn ne nur por la francaj gesamideanoj, sed ankaŭ por eksterlandaj geesperantistoj.

Ankaŭ mi tie travivis du belajn, senzorgajn semajnojn. Dum mia restado mi havis ĉiam brilan, bluan ĉielon, bonajn apetitigajn manĝaĵojn, kaj estis multe da plezuro kaj amuzo; klerigaj prelegoj kaj lingvaj diskutoj ŝanĝiĝis kun ekskursoj en la belega ĉirkaŭaĵo. Entute mi povas diri: Mi vivis tie „kiel Dio en Francio“.

Rilate al la kutimaj francaj prezoj la restado estis malmultekosta. Mi nur iomete povas danki al la gastigintoj per la rekomendo al ĉiuj esperantistoj, viziti en la nuna jaro kaste-

lon Grésillon, la kulturalan domon de la franca esperantistaro. Tie la fremduloj ne nur vivas efektive en Esperantujo, sed ili ankaŭ konatiĝas kun la franca vivmaniero kaj la franca kuirarto. Estas ĉiam bone ekkoni la kutimojn de niaj najbaroj; tio estas grava kaj efika paŝo al la unuigitaj ŝtatoj de Eŭropo.

Aldone mi volas fari proponon. Preskaŭ ĉiuj esperantistoj libertempas kelkajn tagojn en ĉiu jaro. Ili jam nun decidu libertempoj nur en Esperantujo. Kaj la naciaj asocioj jam nun organizu eblecojn por komunaj libertempaj vojaĝoj ekz. dum Novjaro, Pasko, Pentekosto, en la someraj monatoj ktp. Ili organizu karavanojn ĉu en propra lando, ĉu eksterlanden, ekz. al kastelo Grésillon. Estas tasko de la grupoj, ke ili instigu la membrojn al iu restado en Esperantujo.

Dr. Wegener, Essen

Aktuala Terminareto

anprangern (etw.) skurĝi
Besatzungsgeschädigte okupacie-damaĝitoj
Betriebs/kapital ekspluat/kapitalo, entreprena - ~sicher manipul-sekura
Bundespersonalausweis federacia legitimo
das Einjährige machen atingi la mez-studmaturecon
die „Eisheiligen“ majaj frostoj
feldgrau verde-griza
Halbedelstein valorŝtono (Edelstein = juvelŝtono)
Hilfsgemeinschaft help/kolektivo, -unuigo
Jugend/pfleger (urba, landa) junular-zorgisto. ~ring (urba, landa) junularfederacio
Lufthansa aviada kompanio
mitreißen (jm.) entuziasmiĝi
jm. recht geben: konfesi iun prav/a. **ich habe ~ bekommen** oni konfesis min -a. **Ich habe ~ behalten** montriĝis mia -eco
rechtsgerichtet dekstretendeca
rotchinesische Verbände ruĝaĉinaj formacioj
Schwerbeschädigter gravlezito
soziale Marktwirtschaft libermerkata ekonomio
Stadtplan/ung urboplan/ado. ~er -isto
von der Steuer absetzen subtrahi de la impostsumo
überfahren jm.: surveturi iun; Signal: ne atenti signalon
Zimmer/nachweis; Arbeits- ĉambr/ agentejo; labor-, dung-

Ankoraŭ kelkajn vortojn pri la „landoj“ de l' Federacia Respubliko. Ili havas landan parlamenton = **Landtag** kun landa registaro, ministroj kaj ĉefministro = Ministerpräsident. La lando Nordrejn-Vestfalio estas dividita en distriktojn = **Regierungsbezirke** (distriktestro = **Regierungspräsident**). La distriktoj siavice estas dividitaj en subdistriktojn = **Kreise**, nome urbajn kaj kamparajn subdistriktojn (**Stadt- und Landkreise**). La estro de kampara subdistrikto estas la subdistriktestro = **Landrat**; la estro de urba subdistrikto estas la (ĉef)urbestro mem. En kamparaj subdistriktoj funkcias krome distrikta deputitaro = **Kreistag**, en urbaj subdistriktoj la urba deputitaro = **Stadtvertretung**. La kamparaj subdistriktoj estas pludividitaj en komunumojn = **Gemeinden**; la komunumestro germane havas hodiaŭ la nomon **Bürgermeister**. Momentaj specialaĵoj de l' zono brita: Apud la subdistriktestro staras kiel „unua oficisto“ la subdistrikta ĉefdirektoro = **Oberkreisdirektor**, apud la komunumestro la komunuma direktoro = **Gemeindedirektor**, apud la (ĉef)urbestro la urba (ĉef)direktoro = **(Ober)stadtdirektor**. En aliaj partoj de Germanujo — almenaŭ antaŭ la milito — la distriktoj kaj subdistriktoj kaj iliaj estroj kelkloke havis aliajn nomojn, ekzemple distrikto = Kreis (!), subdistrikto

= Oberamt. La Esperantaj nomoj estas la samaj por ĉiuj okazoj: lando estas dividita en distriktojn, ĉi tiuj en subdistriktojn.

Hans Wingen

Perlabori

Perlabori ist ein Zamenhofismus, wenn man dieses Wort prägen darf. Man begegnet ihm nicht selten und kann dann aus dem Satz seine Bedeutung unschwer erkennen. Perlabori = laborakiri, z. B. li devis perlabori

-UJO, -IO, -IJO

Estas fakto, ke la ekuzo de -io kiel landnoma sufikso (kio okazis de UEA baldaŭ post ĝia fondiĝo en 1908) multe ekscitis de tiam la esperantistajn animojn, ne pro la fakto mem, kiu ja ne estas tioma gravaĵo, sed ĉar oni rigardis tiun formon kontraŭfundamenta. Ankoraŭ nun ekzistas konsiderinda nombro da esperantistoj, kiu ne volas rekoni la landnoman sufikson -io kiel rajtigitan tial ke en la Fundamento estas fiksita, ke tiun rolon ja ludu -ujo. Estas neagraba fakto — kaj ankaŭ multaj ujo-anoj tion nepre rekonas —, ke ujo krome havas du aliajn diferencajn signifojn, nome tiun de „vazo“ kaj tiun de „arbo“. Senpartia juĝanto devas tamen konstati, ke landnomoj finiĝantaj je -io tre ofte havas internacie pli konatan formon ol tiuj kun -ujo. En la longa interbatalado de la io- kaj ujo-anoj, kiu ofte akiris akrajn kaj eĉ ekstremajn fazojn, neniu partio povis plene konvinki la alian pri sia propra praveco (ĉar efektive ambaŭ estas pravaj — certagrade, kiel tio ofte okazas en la mondo). Kompromiso, laŭ demokrata kutimo, ĝis nun oni ne povis fari pro la simpla fakto, ke propono por kompromiso ne estis farata kun la sola escepto de -lando. Kvankam ĉi tiu solvo iomete kvietigis la animojn montrante kaj lasante neŭtralan vojon en ĉi tiu afero, tamen plenkontentiga ankaŭ ĉi tiu propono ne estis.

En tiu ĉi situacio aperas kiel ne nur ebla sed eĉ taŭga kaj bonvena solvo la nova landnoma sufikso -iĵo. Ĝi prezentas kelkajn avantaĝojn. Unue ĝi estas neŭtrala, tamen enhavante la internacian -io kaj la tre grandan similecon al la fundamenta -ujo. Ĝi povas esti prononcata mole, glite, ne tiel hake kiel la malmola i-o. Ĝi estas trovebla en la slavaj lingvoj kaj ĝia sono estas trovata fakte jam delonge ĉe multaj esperantistoj mem, ĉe kiuj ekz. en la vorto Italio la i de la finaĵo fluas mole en la sono o, do ekzakte la -iĵo nun proponata. Kaj fine, sed tre grave: Tiu ĉi formo neniel estas rompo aŭ atenco kontraŭ la Fundamento. Ĝi estas simple nova sufikso kiel jam multaj aliaj (ekz. -end, -oz, -iv), eĉ se ne ĉiuj estas jam oficialigitaj. Krome ĝi forprenas de -uj trian signifon, tiel iomete sen-

la vivrimedojn de la tuta familio. Es bedeutet also: akiri ion per sia laboro. Das Wort läßt sich also nicht wie üblich in seine grammatischen Bestandteile zerlegen. Tut man es dennoch, so wird man bemerken, daß da Wortbestandteile fehlen, die man „hinzudenken“ muß, in diesem Falle Ergänzungen: akiri per sia laboro... Nur ein Sprachgenie, wie es unser Meister war, konnte sich einen so treffsicheren Wurf erlauben. Aus: per forto devigi entstand perforti = vergewaltigen und aus: permesi al iu foriri „forpermesi“ = beurlauben; forpermeso ist also forirpermeso.

Wer in Zamenhofs Werken liest, findet noch manche Perle, die im Verborgenen ruht.

M. Butin

sarĝigante tiun tamen ankoraŭ dusignifan sufikson.

Pro ĉiuj ĉi konsideroj la EP decidis modere ekuzi ĉi tiun sufikson; kompreneble la redakcio nepre respektos -ujon kaj -ion en tiuj manuskriptoj, kie oni deziras ilian konservon. La redakcio esperetas tiamaniere eble denove atingi la unuecon pri tiu punkto, kiu regis antaŭ la eble ne tre salutinda enkonduko de -io fare de la granda Hector Hodler.

Kaj nun ni donas la parolon al du samideanoj, kiuj deziras diri sian opinion pri ĉi tiu temo.

Pri la propono de paĝo 15

Laŭ la Fundamento de Esperanto de d-ro Zamenhof „ujo“ estas io kio portas, kio entenas, kio estas plenigita aŭ loĝata de tio kion la radiko nomas. Tio povas kaŭzi dusencecon, ekz. „pomujo“ = ujo de pomoj povas esti arbo en (sur) kiu kreskas aŭ pelveto (vazo) en (sur) kiu kuŝas pomoj. Ĉi tiu dusenceco ne okazas, se „ujo“ signifas landon. „Germanujo“ = ujo de germanoj estas la lando en kiu kreskas „kaj“ loĝas germanoj, „patrujo“ estas la ujo en kiu kreskis „kaj“ loĝis la patroj. „Germanio“ estas io germana, io ajn. (Zamenhof ne uzas la vortojn „io“ kaj „iu“ kiel finaĵojn, ili estas anstataŭataj per „ulo“, ekz. trimastulo, belulo, ne „trimastio“, „beliu“.) Sed tio ne rajtigas uzi la vorton „io“ kiel finaĵon en alia senco. Oni ne disputu pri tio, kion Zamenhof jam regulis, sed, se devigate, pri veraj necesajoj!

„Ijo“ ekzistas nenie en la mondo, ne estas internacia. eĉ ne ianacia.

F. Kraus

-ujo, -io, -iĵo

La artikolo „Propono“ de samideano Josef Sommer en n-ro 2/53 ne nur estas interesa por la Esperantistaro; ĝi eĉ estas tre grava, ankaŭ por la fundamentfidelaj anoj de nia movado. Ĝi laŭ mia opinio vere estas „praktika propono“, ĉar ĝi montras vojon al kompromiso.

La triobla uzado de la sufikso „uj“ povas esti kaŭzo por miskomprenoj.

Ĉu „pomujo“ estas termino por arbo, kiu portas pomojn, ĉu ĉi estas vazo enhavanta pomojn? Mi aldonas la vortojn pirujo, prunujo, ĉerizujo. Ili eble sufiĉas por pruvĵi mian koncepton. Pro tio mi ĝis nun ĉiam anstataŭis ilin en la maniero germana, dirante pomarbo, pirarbo, prunarbo kaj ĉerizarbo. Tiel mi evitis erarojn.

Sed pli malfacila estas la afero rilate al landnomoj, ĉar landoj ne estas vazoj enhavantaj homojn. Pro tio mi ĝis nun formis kelkajn nomojn per „io“, ekzemple Bulgario, Italio, Rumanio, do nomojn germane skribitajn kun la finaĵo „io“. Aliajn landnomojn mi formis per aligo de la vorto „lan-

do“, ekz. Danlando, Germanlando, Ruslando ktp. Sed tiu sistemo de duoblaj formoj ne plene kontentigis min, kaj pro tio mi subtenas la proponon de Josef Sommer.

Kompreneble nia akademio havu la lastan decidon! Ĝi ja ankaŭ decidis pri la uzado de la certe necesa sufikso „end“. La sufikso „ij“ plaĉas al mi, ĉar la vortoj formataj tiamaniere estas facile prononceblaj, ekz. Francio, Germanio, Italio ktp. Tiuj nomoj ankaŭ havas pli agrablan kaj pli belan sonon ol la landnomoj kun „ujo“. Pluajn argumentojn mi ne volas menci, ĉar ili trafe estas esprimitaj en la artikolo „Propono“.

E. Markau

Auf dem Büchertisch

Einzeln eingehende Bücher usw. werden erwähnt, doppelt eingehende besprochen

Esperanto-Missionen. Kvarpaĝaj folioj en formato DIN A 5, nomataj kajeroj, eldonataj de la Sveda Societo por konigi la savon en Kristo. Adreso: Klackavägen, Nora Stad, Svedujo.

Dum la lastaj jaroj Esperanto havis bonan akcepton ĉe la svedaj kristanoj (protestantoj), precipe pro la energio de la sveda sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) kaj de ĝia sveda propagandistino s-ino Anna Alamo-Sandgren, kiu de post 1947 faris ĉ. 1200 preleĝojn pri Esperanto. Multaj kristanoj lernis nian lingvon.

Esperanta Misio intime kunlaboras kun la sveda sekcio de KELI. Ĝia celo estas eldoni kaj laŭeble senpage dissendi kristanan literaturon. La kvar nun eldonitaj kajeroj formas la „Evangelian serion“, ĝia kosto estas unu respondukupon. Kie ne ekzistas tia pagebleco, oni sendas senpage. Al interesoĵoj estas sendata, ankaŭ senpage. Nova Testamento en Esperanto.

La kajeroj komencas per poemo, poste sekvas kelkaj artikoloj pri kristanaj temoj, kaj ĉio estas verkita en bona pura Esperanto. La unua artikolo, ekzemple, estas alvoko „Al vi, esperantisto!“ En ĝi estas dirite, ke sole Jesuo Kristo, kiu estas la vojo kaj la vero kaj la vivo, povas montri al ni, kion Dio volas. Kaj estas rekomendata la studado de la Biblio (la Esperanta Biblio cetere estas bona ankaŭ pro la lingvo).

La multspecaj artikoloj de la kajeroj ne nur plaĉas sed certe helpas al verserĉantaj homoj. A. B.

Zwei Bildpostkarten mit dem Porträt von Dr. L. L. Zamenhof, schwarz auf gutem Kunstdruckkarton mit schreibfähiger Rückseite gedruckt. — Preis: 0,20 DM das Stück bei der Esperanto-Abt. der Limburger Vereinsdruckerei.

Von jeher haben sich Karten mit dem Bild unseres Meisters großer Beliebtheit unter den Esperantisten erfreut. Es gab davon schon sehr schöne, aber auch weniger schöne. Die von Limburg herausgegebenen kann man ohne Bedenken der ersten Kategorie zuzählen. Der Preis ist niedrig, besonders wenn man feststellt, daß bereits von 10 Stück an eine Verbiligung eintritt, die sich bei 100 Stück schon auf 50 Prozent beläuft. Es kann also damit eine Propaganda gemacht werden, die wirkungsvoll und nicht teuer ist. Für den Esperantisten selbst sollten die Karten mit dem gütigen Antlitz unseres Meisters immer wieder ein Ansporn zu eifriger Arbeit für sein Werk sein. B. K.

En la pasinta aŭtuno aperis nova libro de registara konsilisto d-ro Eugen Koller, Regensburg, Aŭbere Lappersdorfer Straße 67/o. La leginda libro portas la titolon „Nia lernejo — libro por edukistoj kaj gepatroj“ (Robert-Zeise-Verlag, Regensburg; broŝ.: 4,20 DM).

La aŭtoro estas tre konata en pedagogiaj rondoj precipe pro siaj libroj pri

nova kalkulinstruo en la unuaj lernjaroj; lia nuna libro sendube indas esti preparolita ne nur en pedagogiaj fakgazetoj, sed ankaŭ en gazetoj Esperantaj, ĉar ĝi enhavas gravan proponon pri la plibonigo de fremdlingva instruado en lernejoj tutmondaj kaj rekomendas la enkondukon de Esperanto kiel duan lingvon por ĉiuj infanoj en ĉiuj landoj.

Mi citas p. 82: „En ĉiuj landoj de la mondo ĉiu infano lernu nur du lingvojn: sian gepatran kaj Esperanton. Lingvolernado laŭdire fortigas la logikan penson. Tamen ĉiu lingvo ĝisnuna konsistas duone el sensecaj esceptoj de ĉiuj logikaj reguloj.

Esperanto estas la sola lingvo konstruita tute logike kaj same kiel la matematiko ne permesanta esceptojn de la regulo.

Esperanto estas la sola reala mondlingvo. La kunlaboro de la sciencoj, krome mondpolitiko kaj mondtrafiko ĉiam pli urĝe postulas mondlingvon. La tempo de romantikaj idilioj kun prinĉandetoj (Fürstentümle) kaj poŝtdroŝkoj preterestis. La lingva miksamano plimalfaciligas la interkomprenon. Ni deziras aŭdi de la radiostacio en ĉiu novjara nokto mondlingdisaŭdigon, en kiu ĉiuj popoloj de la mondo fratece parolas unuj kun la aliaj, sin reciproke vokas kaj respondas unuj al la aliaj en la komuna lingvo Esperanto!“

Kaj aliloke d-ro Koller skribas: „Ĉiu komencu konstrui unue nur per malgranda ŝtono kaj kunigu ĝin post ĝin ŝtonon sur ŝtonon. Kompreneble neniu homo povas krei ĉion. Sed se ĉiu akvoguteto pensus: „Mi sola ne povas fari ĝin“ — tiam ĉiuj turbinoj ĉesus turniĝi. Pestalozzi eĉ kiel maljunulo ankoraŭfoje ekkomencis denove, kvankam lia vivoverko estis disbatita. ... Popolo, kiu havas pli da mono por rearbado ol por la edukado de la junularo, tia popolo endanĝerigas!“

„Patrolando, instru al viaj filoj ami ne la glavon, sed la lumon!“ diras Pestalozzi.

Mi tre ĝojas, ke d-ro Koller, kiu mem ne parolas nian lingvon, tamen rekomendas ĝin en tia arda kaj konvinkanta maniero, kio pravas ne nur la veran taŭgecon de Esperanto, sed ankaŭ la vastan spiritan kapablecon de tiu ĉi aŭtoro.

Walter Walther

Kvaropo. Poemoj de Auld, Dinwoodie, Francis, Rossetti. Antaŭparolo de G. Waringhien. 267 paĝoj, 16 × 22,5 cm. „Stafeto“, Belliteratura eldonserio I. Eldonis: J. Régulo Pérez, La Laguna, Tenerife, Kanariaj Insuloj. Prezo 10 anglaj ŝilingoj aŭ 1,50 usonaj dolaroj plus sendkostoj.

Wir wissen ja alle, daß die Freude an Versen und Gedichten durchaus nicht jedermanns Sache ist, ja, daß sehr viele Menschen das Lesen solcher Werke geradezu ängstlich vermeiden. Von den Gedichten, die sie während ihrer Schulzeit lernen mußten, ist ihnen vielleicht noch etwas in Erinnerung geblieben. Das ist dann aber auch ihr ganzer geistiger Bestand an Poesie.

Und wie steht es bei den Esperantisten? Kaum viel anders, das wird man sagen dürfen, ohne sich einer Übertreibung schul-

Unu jaron por tri!

Por plialtigi nian abonantaron ni havas proponon: Kiu varbos por Esperanto-Post ĝis 30a de Septembro 1953 tri novajn jarabonantojn, al tiu ni liveros ĝin por unu tuta jaro senkoste. Niajn nunajn abonantojn ni petas helpi al ni kaj varbi. Ni esperas pri via kunlaboro kaj jam nun dankas por viaj klopodoj. Plialtigo de nia abonantaro signifos pliriĝigon kaj plibeligon de nia revuo

Esperanto-Post

Internacia Fazio-Semajno 1953

18a–24a de Julio en Konstanz/Bodensee

Riĉa turisma kaj kultura programo. Perfekta Esperanto-kurso. Petu ilustritan invit-programon ĉe: IFS Esperanto, Konstanz, Grüngang 8

Unser Verlagsprospekt

„Wer Esperanto kann, hat mehr vom Leben“ steht allen Lesern der Esperanto-Post kostenlos zu Werbezwecken für Kurse und Vorträge zur Verfügung. Bitte, schreiben Sie uns!

Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn

Schülerpension


für aufgeweckte, charaktervolle Jungen. Sextaner bis Quartaner, auch Volksschüler zur Vorbereitung für höhere Schule.

Günstige Schulverhältnisse. Familiäre Betreuung durch Lehrerehepaar mit Internatserfahrung.

Sonderkurse in Esperanto und praktische Anwendung.

Joseph Marichal
Neuwied, Bahnhofstraße 4

Verlag und Druck: Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg. Herausgeber: Ludwig Goppel, Limburg/Lahn. Hauptschriftleiter: Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Ehrenbergstr. 1. Nachdruck nur mit Genehmigung der Schriftleitung. — Bezugspreis: Vierteljährlich 1,50 DM zuzüglich — 12 DM Zustellungskosten. Erfüllungsort ist Limburg/Lahn. — Alle Zuschriften für die Redaktion an Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Bestellungen und Anschriftenänderungen nur an die Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn, Diezer Straße 17, Postscheck-Konto: Frankfurt am Main, Nr. 123 82; Bank-Konten: Limburger Bank, Kreissparkasse Limburg, Nassauische Landesbank, Filiale Limburg.



En Frankfurto ĉe la malnova urbodomo „Römer“

Fortsetzung: Kvaropo

dig zu machen. Deshalb ist es von seiten unseres spanischen Samideano Juan Régulo Pérez von den fernen Kanarischen Inseln schon ein Wagnis, mit einem umfangreichen Band Esperanto-Gedichte an die Öffentlichkeit zu treten. Im übrigen ist das Buch hervorragend ausgestattet: Ausgezeichnet gutes Papier, sauberer Druck, eine durchaus geschmackvolle moderne Decke. Und dem entspricht auch der Inhalt. Ein Viergespann von Dichtern stellt sich vor, Schotten alle vier, und alle überschattet vom Geiste i h r e s Meisters, Kolomano Kalocsay, dem die vier in einem Abschnitt „Manoplekte“ anlässlich seines 60. Geburtstages (6. 10. 1951) ihre poetischen Huldigungen darbringen. Dinwoodie z. B. ruft ihn an:

Ho majstro de la frazo gemobri!
Majstro de l' verso polurita, ĉarma!
Kiel nin sorĉas via art' subtila
riĉa je l' sentabund' de via koro varma!

Daß der Einfluß Kalocsays auf die vier natürlich auch in den von ihm eingeführten Neuwörtern, die er im „Parnasa Gvidlibro“ gesammelt hat, zum Ausdruck kommt, ist selbstverständlich, und das Viergespann hat davon in reichlichem (mitunter wohl allzu reichlichem) Umfange Gebrauch gemacht. Dem unvoreingenommenen Beurteiler erscheint es aber gerecht festzustellen, daß dieses von Kalocsay geschaffene poetische Rüstzeug wirklich nötig ist. Manche der Gedichte wären ohne diese Neuwörter schlechterdings unmöglich. Deshalb: Auch der Poesie ihr Fakteterminaro!

Wer sind nun diese vier, die das Erbe des verstummten Kalocsay angetreten haben? Schotten sind es, merkwürdigerweise, wie bereits angedeutet, durchaus eigene Persönlichkeiten mit ganz gesonderten Interessen und poetischen Standpunkten. In drei Rimpfortretoj werden Auld, Dinwoodie und Francis von Rossetti gezeichnet: Jen Vilĉjo Auld, poet' konscia, divershumore lin animas socia tem' aŭ stat' ebria! — Dinwoodie diligente lumas per klaro de la verda lenso, und Francis: malkovra intelekto. Über Rossetti steuert Auld ein Rimpfortreto bei, in dem es heißt: Se per liriko li komentas / aŭ per malĉasta limeriko / Rossetti nepre ĉeftalentas / pri l' esperanta semantiko.

Nun könnte es scheinen, als ob die vier sich nur gegenseitig andichteten. Mitnichten! Die Gedichte sind von einer derartigen Mannigfaltigkeit, daß man sie wirklich staunend bewundert. Darf ich einige Anfänge zitieren? Altaj montkasteloj ĉe la vala limo; Anna, diskruira kaj enua; Dika senforma laborist-edzino; Ek de Eva kaj Adamo; Eklerni Esperanton vi evitas; El Ajrolo en Svislando; Foje ŝi sur mola herbkuseno; For neologismoj; La vivo estas karuselo; Palaj nudulinoj brakas; Se miaj pensoj estus kugloj! Sip' en onda mar' vi estas; Tamen ne hurla, kiel sola hundo; Vi estas veneno; Vi venis. Das ist eine wahllose Auswahl. Man kann nur sagen: Wem die Esperanto-Poesie etwas bedeutet, der greife nach diesem unerschöpflichen Buche. Er wird sich etwas mühen müssen, aber schönsten Lohn dafür ernten. Und er wird immer mehr Ehrfurcht und Bewunderung vor der geradezu wunderbaren Biegsamkeit und Schmiegsamkeit des Esperanto empfinden. J. F. Berger

Por ke nia legantaro konatiĝu ankaŭ kun alia prijugo, ni publikigas ĉi-sekve recenzojn de nia estimata meksika samideano Francisko Azorin.

Mi ĵus legis belan libron, „Kvaropo“. Ĝi estas alta honoro por Esperanto; gloro por la aŭtoroj Auld, Francis, Dinwoodie, Rossetti, kaj brila sukceso por la eldoninto, nia samideano Régulo Pérez.

Otte la recenzoj estas listo de preseraroj, noto simpla pri mankoj kaj malmankoj. „Kvaropo“ estas perfekta eĉ por korektesto. Arte verkita, mirinde prezentita, ĝi estas vera juvelo en nia literaturo. La esperantismo povas sin vesti feste kaj bati forte turnsonorilojn por solenigi la okazajon. La kvar poetoj estas plense ne . . . poetoj. Ĉu pli adekvata juĝo?

Por diri ion kritike, mi okupiĝos pri la prologanto. Ja li ne partoprenas en la kvaropo, krom por malheligi la opon. Ĉu intence por elstarigi la kontraston? Sed, ni detalu. En lia Antaŭparolo li diras kuriozaĵojn. Inter aliaj, ke Esperanto „estigis du tute originalajn al si proprajn kreaĵojn: unu ideologion, la sennacismon, kaj unu arton, la esperantan poezion“.

La sennacismon? Sed ja anarkistoj kaj socialistoj sin konsideris, pli frue ol ni, civitanoj de la mondo, kaj ili kreis, kaj eĉ muzikis, la „Internacion“, kiel sennaciecan himnon. Pli antaŭe ankoraŭ, Kristo kaj la kristanoj malestimis la landlimojn kaj predikis fratecon inter ĉiuj homoj, tute sennaciece; la vorto katolikismo devenas de ili kaj signifas universalecon. Certe, unuj kaj aliaj, kiel ni, la sennaciecaj esperantistoj, estis devigataj sin submeti al Cezaro kaj adopti naciecon . . . sed la ideo, la ideo . . . ne estas originala, sinjoro.

La „esperanta poezio“ jes, tio estas esperanta kreaĵo; kiel la esperanta prozo, krome: kiel la esperanta literaturo: kiel la esperanta gramatiko, kiel . . . la Esperanta ŝercado. Sed ĉu ne estas naŭva infanaĵo diri tion?

La antaŭparolanto diras aliajn frazojn graciajn: „poetoj ne levigas kiel fungoj“. Se li estus skribinta „ne aperas“ aŭ „ne kreskas“, tio estus, se ne tro inda komparo, almenaŭ tropo tolerebla. Sed „levigas!“ Por tia retorika figuro, ĉu li ne trovis alian planton pli elstaran, kiu levigis pli ol la mizeraj, malaltaj fungoj?

Krom la frazoj graciaj, la stilo estas pena. La artikolon difinitan li uzas arbitre, kaj kvankam en sia P. G. li mem diris, ke la posedpronomoj, kiam ili rolas kiel reprezentantoj, estas akompanataj de la artikolo (ĉu?) kaj eĉ aldonas: „kun artikolo la esprimo estas pli plastika“, li tamen ne agas laŭ tio en sia Antaŭparolo. Ankaŭ la uzado de verbaj tempoj ne estas ekzakta.

Por fini, li diras: „Esperanto ne povas formorti“. Ne, ne mortos; nek for, malproksime, nek baldaŭ proksime. Sed ĉar li volas tutsimple diri ke Esperanto ne mortos, kial uzi superfluan afksojn? Tio estas fuŝi la lingvon.

Al la poetoj gratulojn; pli da gratuloj, se ili ne uzus tiom da novismoj (neologismoj, por la ortodoksuloj).

Francisko Azorin



Frankfurto: La katedralo, la Majno kaj iamaj domoj

Kliŝojn disponigis afable la Urbratfika Oficejo de Frankfurto.

